# BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO-INSTITUTO

**Nr 47 Junio 2003**
**Adreso: p/o Bardhyl Selimi Rr. Maliq Muço P.50 A.3 Tiranë Albanio**
**Telefonoj: +355 4 241272 (Vasil, prezidanto); +355 4 238 558; ++355 68 25 80 758 (Bardhyl , sekretario); +355 4 363360 (Rita , kasistino)**
**Rete:** pistolii@email.com (Vasil); selimib@albmail.com (Bardhyl); adoci@gmx.de (Artur) ; shhasani@albmail.com (Shaban); hamotto@aul.com.al (Martha) **;** beqirajs@hotmail.com (Saimir Beqiraj) ; matildasokoli@yahoo.com (Matilda ; (Ariel) a_myrazi@yahoo.com ; sambeg2000@yahoo.com (Saimir Begollari); dpermeti@amc.al (Rita); dorian77@hotmail.com (Doriani); mgumeni@lincoln.org.al (Jon); hysaerald@yahoo.it (Eraldi); ereid@wp.pl (Ereidi)
**Retpag'o** : http://www.esperantio.tk

**La enhavo de tiu c'i numero**


- Novaj'oj el la E- movado enlande
- Rilatoj AIS-AEI
- Rilatoj UEA-TEJO kaj Albanio
- Rilatoj ILEI-AEI
- Nialanda E- historio
- El la leteroj
- Kontribuaj'oj de niaj geamikoj eksterlandaj
- Intervjuoj
- Beletro-prelegoj , poeziaj'oj kaj humuraj'oj
- Artikoloj
- El la diplomoj de niaj gestudentoj bakalau'rig'intaj


**Ekzamenoj**

Je 23-an de majo 2003 okazis ekzamenig'o en la blindulejo de Tirana. 6 gelernantoj, nome Artemisa Cufaj, Bukurie Daci, Zylfi Lusha, Besmir Gjini, Eva Hysa, Blerta Bushi akiris la diplomon pri la elementa nivelo de Esperanto. C'eestis la viclernejestro s-ro Timo Bushi. Gvidis la ekzamenon s-ro Vasil Pistoli, direktoro de la Albana Esperanto-Instituto.

**Rita Permeti**

**Nia kasisto raportas**

Antau' nelonge pagis por nia Sekcio la jarkotizon gesinjoroj Martha Otto (1000 L je 21.02.2003); Gjergji Gusho (500 L je 10.04.2003); Shaban Hasani (1500 L je 24.04.2003); Nehat Sokoli (200 L je 20.04.2003); Bardhyl Selimi (400 L je 05.01.2003); Matilda Sokoli (400 L je 15.04.2003)

**Rita Permeti**

**Albanio en Esperanta Gazetaro**

"La Gazeto", (Francio), organo de OSIEK, publikigis longan artikolon (preskau' 7-pag'a) de B.Selimi je titolo "La Albana Lingvo" en g'ia numero de aprilo 2003. La subtitoloj esprimas iel ties enhavon: La deveno de la albana, La komencoj de la skriba albana, Komenco de la albana beletro, La dialektoj de la albana, La normita albana, Kelkaj karakterizaj'oj de la hodiau'a lingvo, La disvastig'o de la albana lingvo, Studoj pri la albana.

**Artur Doc'i**

__**Novaj libroj**__

**La regno de la plenhomaro ekde 5040**

- Lastatempe s-ro Gerard Cool el Au'strio estas donacinta al nia Instituto lian novan verkon "La Regno de la Plenhomaro ekde 5040". Tiu libro sekvas serion de aliaj liaj verkoj futuristikaj, tre valoraj. Redaktoro kaj prizorganto de la libro estas s-ro Petko Arnaudov. Eldonis g'in Esp. Societo "Radio"-Pazarg'ik, 2003. La libron oni petu de la libroprizorganto Petko Arnaudov, str. "Nikifor Popkostantinov" 40, 4400 Pazarg'ik, BG au' pa@telecablenet.com
- Aperis en la albana la libro "Balkana Kuirejo" lau' la Esperanto versio prizorgita de s-ano Petko Arnaudov. Sur la kovrilpag'o de la albana eldono estas notita "Tradukita el Esperanto" kaj la eldonejo estas Albana Esperanto-Instituto.

**Matilda Sokoli**

__**RILATOJ AEI-AIS**__

Responde al viaj demandoj, starigitaj en retletero de 2003-05-05 mi - post interparolado kun la prezidanto kaj de li starigita interkonsento kun la koncernaj instancoj - sendas jenajn informojn:

A/ Cxu partopreno en ProvSUS en Karlovo 16-22 de septembro 2003 por AIS gestudentoj estos senpaga (krom pagi necesajn tranoktojn)?
RESPONDO: JES

B/ Kiom necesos pagi en Euroj en Karlovo por bakalaura ekzameno kun 80% rabato?
RESPONDO: originala bakalaura ekzameno: 87.10 Euroj

C/ Kiom necesos pagi en Euroj en Karlovo por magistra ekzameno kun 80% rabato?
RESPONDO: originala magistra ekzameno : 141.70 Euroj

D/ Kiom necesas pagi por Kursekzamenetoj kaj ev. aliaj kostoj kun 80% rabato?
RESPONDO: por unu - du - tri - kvar atestoj (c^u kun, c^u sen ekzameno): 0 - 1.30 - 5.20 - 9.10 Euroj

Krome: La koncernataj instancoj de AIS forte malkonsilas, ke studento g^iru iun kotizon al privata konto. Se g^irado al la oficiala konto de AIS kauzas malfacilaj^on, ni pretas akcepti kotizojn ec^ dum la sesio (kompreneble antau la ekzameno) per kontanta mono -

sen postuli pro tio malfruig^kotizojn. Se tamen kandidato au studento jam estas g^irinta iun kotizon, li

a) anoncu tion tuj kaj

b) nepre kunportu kvitancon al la sesio

(Sen prezentado de kvitanco au kontanta pagado ekzameno ne eblas)

La ekzamenoficon reprezentos en Karlovo OProf. Lobin (en San Marino/Rimini la direktoro de la ekzamenofico, OProf. Minnaja, mem c^eestos). Pri la kursatestoj (pagado kaj disdonado) responsas la klerigofico. Dum ambau c^ijaraj SUSoj ties direktoro, OProf Quednau, c^eestos (en San Marino/ Rimini c^eestos ankau ties vicdirektoro, Oprof Foessmeier). Ni petas, ke vi transdonu tiujn decidojn al la AIS-studentoj en Bydgoszcz kaj komuniku al ni, kiuj el la g^isnunaj kandidatoj - nun informitaj pri la kondic^oj - volas ekzamenig^i c^i-jare en Karlovo (au eventuale en San Marino, kvankam tie la rabato ne validas) Ili ankau pripensu, ke por la magistrig^o necesas 80 "rezultaj" studunuoj (aldone al la 40 jam uzitaj por la bakalaureco) AIS-studentoj estas tiuj personoj, kies nomoj estas enskribitaj en la listo de "STUDENTAJ LEGITIMILOJ eldonitaj de AIS" (TTT-adreso = http://www.ais sanmarino.de/klerigofico/legittabelo.unicode.html) kaj kie la atributo val(ideco) havas la valoron "1".

Mi salutas elkore vin kaj viajn studentojn kaj deziras multan sukceson al c^iuj kandidatoj

**Dieter Quednau**

Kara kolego,

La kontrolo de la studado de la kandidatoj, kiujn vi menciis en via letero, donis jenajn rezultojn:

**Berberi:** 5 administraj -> 7.5 rezultaj studunuoj (el tiuj 3 -> 4.5 dum studado en Bydgoszcz c^e ASci Bondar 2 -> 3.0 dum BUS 4)

**Pashaj:** 8 administraj -> 8.5 rezultaj studunuoj (el tiuj 6 -> 6.0 dum studado en Bydgoszcz c^e ASci Bondar 2 -> 2.5 dum BUS 4)

**Canga**: 13 administraj -> 16 rezultaj studunuoj (el tiuj 9 -> 12.0 dum studado en Bydgoszcz c^e ASci Bondar 3 -> 3.0 dum la 21a Pola studadsesio 1 -> 1.0 dum BUS 4)

Do, c^iuj estas malproksime de la minimumo de 40 rezultaj studunuoj, postulataj por bakalaurig^i. Se ili ricevis pluajn unuojn, pri kiuj mi ne estas informita, au ankorau studas en AKB en Bydgoszcz au en iu universitato kaj povas realisme esperi ke ili atingos la mankantajn unuojn g^is septembro, mi petas pri baldaua informo.

**Elkore salutas**

**Dieter Quednau**

Karaj gekolegoj,

J^us alvenis letero de la trezoristo de AIS, kiu donas la necesajn informojn pri la pola konto, al kiu g^iradoj povas okazi: From trezoristo@ais-sanmarino.org Fri May 9 14:36:39 2003

**Problemo de kotizoj en Karlovo**

Blewo1@pbhrzsd.uni-paderborn (Joana Lewoc) skribis al Ereid Dhimitri: Estimata s-ro Dhimitri, via letero ripetig'as, mi ripetas la respondon al vi kaj s-ro Quednau (Dhimitri: vi skribis ke mi devas pagi 106 eu'roj c'ar mia bakalau'rig'o ankorau' ne estas finita. Mi bedau'rinde ne komprenas, de kio venas tiu sumo). Temas pri kotizo neniam alveninta al

AIS. Bv. Rigardi la oficialan decidon diskonigitan tutunue de la prezidanto de AIS al SUS-c'eestantoj en Nitra.
Dhimitri dau'rigas: S'i skribis ke por magistrigi en Bulgario ni devas pagi 474,5 eu'roj kaj mi devas pagi g'is 2003.05.19.
Respondo: la kotizo por magistrig'o en Karlovo estas por kandidatoj el Orienta Eu'ropo 141.7 eu'roj-pagenda plej malfrue dum la sesio antau' la ekzameno.
La kotizoj c'iam dependas de la unuopa kazo , c'efe de bonorda pritraktado flanke de studentoj mem. Flanke de la Ekzamenofico mi ne povas konfirmi tiun sumon, ec' se estos 80 % rabato. Konsilo pagi surloke ne estas bona, c'ar aldonig'as tiam malfruig'kotizo. J'us por eviti g'is nun tre problemhavigan peradon de pagado, kaj por lau'eble eviti bankajn problemojn (longa tempo de g'irado, g'irkostoj ktp) estis starigita AIS-konto en Pollando. Kolego Quednau vers'ajne nur forgesis, ke en Nitra la senato tuj dum sia unua kunsido estis sciigita pri detaloj.
**Joanna Lewoc**
Estimataj,
ne konante la leteron de s-ro Grzebowski, kiun respondas kolego Quednau, kiu siaflanke laux la respondoj ne konas la leteron de la Ekzamenofico al la kandidatoj, mi ankorauxfoje komunikas, ke cxiu kandidato ricevis informonpri siaj kotizoj (forsenditan en aprilo), kaj ke kurskotizoj (samkiel ekzamenkotizoj) prezentitaj sube de la kolego ne respegulas la validan kotizaron kaj estas bedauxrinde eraraj. Tio estas evidenta (ekzemple pro la cifero nulo), sed pro klareco mi ripetas tion; la samo estas komunikita
al cxiuj AIS-klerigejoj antaux unu-du jaroj.
La ne precizigitaj instancoj en la suba letero ne informis la efektivan laborlokon de la Ekzamenofico pri iuj decidoj, evidente ankaux ne la financoficon, kiu kontraste al la eldirajxo de kolego Quednau (kiu malkonsilas), forte subtenas pagadon al la pola AIS-konto; neniuj decidoj gxis nun alvenis ankaux flanke de la senato; kaj konsiderante la malgxustajn ciferojn pri kotizoj prezentitaj de la kolego, same kiel tion, ke pri ekzamenoj respondecas la Ekzamenofico, sur tiu bazo mi ne povas sxangxi la enhavon de la dissenditaj oficialaj sciigoj al studentoj.
Sincere,
**Joanna Lewoc**

## <u>RILATOJ UEA-TEJO-ALBANIO</u>

### Trejnseminario en Sarajevo marto 2004

Lau' informo de s-ro Hokan Lundberg, UEA estas planinta trejnseminarion en Sarajevo marte 2004. Tiucele g'i intencas peti monon de UEA-membroj kaj serc'i partnerojn en Balkanio , same. Ni proponis frau'linon Matilda Sokoli, aktivulino en nia enlanda junulara movado de E. Jam estas trovitaj partneroj en aliaj landoj (Bosnio&Hercegovino, Kroatio, Serbio&Montenegro, Norvegio, Svedio kaj Francio).
AEI proponis kiel partneron frau'linon Matilda Sokoli.
**Vasil Pistoli**

## <u>ILEI kaj NI</u>

Karaj,
Jen gazetara komuniko dissendita hierau, por provi revivigi la vendadon de ILEI-libroj.

Via helpo diskonigi gxin estas bonvena, kiel ankau via mendado! Des pli nun, cxar en sekvaj semajnoj ni dissendos numeron du de "Juna amiko" kaj povos pli konvene plenumi libro-mendojn kadre de la sama sendo-vojo.
Komitatanoj ricevis raporton pri la eldonado en 2002. Mi baldau suplementos tion per resumo pri la faritaj fakturoj, kio tamen ne sxangxas la raportitan konkludon ke la vendoj estis tre modestaj.
Kore,
**Stefan MacGill**
ILEI, eldonado.
**Lerno-kompleto de ILEI**
Nia instruista ligo pretigas lernilojn precipe por pli junaj lernantoj kaj koncentras la atenton al studiloj uzeblaj internacie, alivorte, en kiuj aperas nur Esperanto. Ili estas preparitaj lau la ideoj de komunika instruado, nome ke la baza lingva unuo estas la frazo, kaj oni de la komenco uzas la lingvon aktive por dialogi, komunikante ideojn kaj nociojn.
Por komencantoj, la propono estas Okuloj, 44-pagxa kolore ilustrita kajero, pretigita por infanoj inter 6- kaj 10-jaraj. Gxi prezentas 440 radikojn, el kiuj pli ol kvardek estas verboj -- la motoroj de la frazoj. Ili aperas en adekvataj kuntekstoj, tiel ke lernantoj tuj dekomence scias ne nur la verbon sed ankau la uz-manieron -- kun au sen rekta objekto. Aperis ankau Okulo Gvidilo por la instruisto au kursgvidanto. Gxi resumas por cxiu pagxo de la studenta kajero la novajn vortojn, gramatikajxon, komunikajn lertojn, kaj krome prezentas praktikajn konsilojn kiel prezenti la pagxon kaj kiujn pliajn agadojn au ludojn oni povas uzi. La dua parto de la gvidilo prezentas fotokopipretajn ekzercojn, tiel ke instruisto povas mem tre facile pretigi task-foliojn por la klasanoj, sxparante la tempon mem krei ilin.
Por daurigi la kursojn ekde la fino de la studado de "Okulo", ni proponas kajerojn du kaj tri de la serio Tendaraj tagoj. Tiu transiro eblas, cxar Okulo kovras la saman vort-trezoron kaj gramatikon kiel la unua kajero de Tendaraj Tagoj, kiu ne plu estas havebla de ILEI (sed eble restas cxe iuj libroservoj). La dua kajero estas unuavice destinita por lernantoj inter 10- kaj 16-jaraj; gvidila materialo por gxiaj komencaj pagxoj estas troveblaj en la hejmpagxo de ILEI. La tria kajero de Tendaraj tagoj konvenas por cxiuj lernantoj pli ol 10-jaraj, gxi estas uzebla ecx por kursoj de la supera nivelo.
Kiel aldona helpilo ni proponas grandformatan kantlibron de norvega kolego. Oni povas trovi pliajn informojn pri cxi tiuj verkoj en la hejmpagxo <<http://www.edukado.net>>.
Okulo, kajero 1, 44p, ilustrita de Monika Molnar. EUR 4,50.
Okulo, Gvidilo por kajero 1, ilustrita de Monika Molnar. EUR 4,50.
Tendaraj tagoj, kajero 2, 72p. ilustrita de Pavel Rak, EUR 6,90.
Tendaraj tagoj, kajero 3, 76p. ilustrita de Pavel Rak, EUR 6,90.
Fantaziajxoj kaj kantoj por infanoj, Jon Rommesmo, 100p. EUR 3,60.
Mendeblaj de la libroservo de UEA (triona rabato ekde 3 ekzempleroj por Tendaraj tagoj, plus sendokostoj).
Mendeblaj de ILEI (posxte: Pannonia u. 30 I 6, HU-1136 Budapest.Rete: stefan.macgill@galamb.net), triona rabato por cxiuj verkoj ekde 3 ekzempleroj de ajna titolo, sendokostoj inkluzivitaj.

## NIA HISTORIO

## ALBANA ESPERANTO LIGO EN G'IA DEKDUJARIG'O

Prelego en la Konferenco “Esperanto en Balkano”, maje 2003

### Iom da historio

La unuaj spuroj de Esperanto en Albanio vers’ajne datig’as ekde jaro 1907. Estis ja albanaj studentoj eksterlande kiuj konatig’is unuafoje kun Esperanto en universitatoj au’ mezlernejoj tie. Ekzemple konata kuracisto forpasinta Hamdi Sulçebe estis gimnaziano en Vieno. Iutage vizitis lin esperantisto loka kaj propagandis al li la internacian lingvon. Ekde tiu tago Hamdi eklernis pasie E. kaj disvastigis g’in reveninte en Albanion. La samon faris ing’. C’efo Fico, same forpasinta. Li partoprenis konkurson pri E. en universitato en Torino, Italio kaj gajnis premion: ekskurso senpaga tra la tuta Italio. Tio ege kurag’igis lin pliperfektigu siajn konojn de la bona lingvo kaj reveninte hejmen disgastigi g’in en la junularon albanan. Tiel konatig’is kun Esperanto pluraj aliaj albanaj studentoj kiel Lazër Shantoja, Mark Kakariqi, Cuk Simoni kaj fratoj Wilhelm kaj Simon Koliqi el la norda antikva urbo Shkoder. Wilhelm havis vastan korespondon tutglobe, dum lia frato Simon estis kardinalo. Cuk verkis en Esperanto originalan libron pri la vivo kaj faroj de Skanderbeg, albana nacia heroo. Lazer kaj Mark estis pastroj ege suferintaj, ec’ mortigitaj de komunisma reg’imo, post la jaro 1944.

Dum s-ro Janko Pali, same forpasinta, ekkonis Esperanton tute hazarde trafoliumante duonbruligitan libron apud butiko en sia vilag’o c’eborde en sudo , dum la sanguma unua mondmilito..

Kompreneble, Esperanto konis notindan disvastecon post la Dua Mondmilito, kiam ankau’ la klereco de la log’antaro iam malalfabeta plejmulte, plialtig’is kaj eduksistemo ampleksigis la tutan landon. Tiel esperantistig’is doc Vasil Pistoli , aktuala direktoro de la Albana Esperanto-Instituto, c’irkau’ 80 jara kaj pluraj aliaj intelektuloj.

Zef Mjeda, honora membro de UEA, forpasinta jam, esperantistig’is en la jaro 1958 , denove hazarde. Li estis vizitanta ekspozicion de vjetnamaj pentristoj en Shkoder. En la ekspoziciejo estis ankau’ la ima ambasadoro de Vjetnamio, eminentulo de la porpaca movado kaj same esperantisto. Ili renkontig’is kaj komunikig’is en la franca . Interalie vjetnamo propagandis al Zef la bonan lingvon , donacante ec’ lernolibron de .

Ekde tiam Zef ekinteresig’is serioze pri la lingvo kaj ellernis g’in profunde. Li ec’ kompilis grandan vortaron Albana-Itala –Esperanta kaj tradukis en Esperanton tutan serion de albanaj legendoj kaj kanzonoj pri bravuloj, same fabelojn popolajn.

### Fondig’o de la Albana Esperanto-Ligo

Marte 1991 estas fondita AEL (Albana Esperanto- Ligo) tuj post demokratiig'o de la politika vivo de la lando. Komence estis kelkaj esperantistoj kiuj aktivis antau'e individue, c'u en Tirane, en Durres kaj aliloke. Ili ne estis multnombraj kaj plejmulto el ili ne posedis sufic'e bone la lingvon, ec' pro fakto ke ili ne havis antau'e la eblecon praktiki g'in. Mi, Gafur Muço ka eklernis Esperanton en la lernokurso gvidita de s-ro C’efo Fico en la kulturdomo de Tirana , vintre –printempe 1961-1962, kaj praktikis g’in per korespondo kaj per legado de revuoj alvenintaj c’efe el C’inio, Vjetnamio, Laoso kaj nur rare el UEA, kiu estis membriginta nin senpage sendante ankau’ la Jarlibron! Ni povis tamen fari nur malmulton c’ar la libera movado (nekontrolata de la s’tato komunisma ) estis strikte malpermesata , kiel sciite. Ni sukcesis esperantigi la tekston de unu dokumenta filmo pri la urbo-muzeo- Gjirokaster, en la jaro 1967, eldonis libreton pri Skanderbeg, tradukaj’o el originalo de prof. Kristo Frasheri. Bedau’rinde, tiu libreto kiu plejparte enkartonig’is de la s’tato c’ar estis skribita en “stranga lingvo”.

Tamen , iniciate de Gafur Muço, Doc. Vasil Pistoli, Luan Jaupi, Rita Permeti ka oni fondis AEL jure agnoskita de Ministerio pri Kulturo. La unua prezidanto estis elektita Gafur Muço.

Tiutempe mi instruis matematikon al kamparanaj gefiloj apud Tirana kie dum 15 jaroj mi estis kondamnita labori pro politikaj kialoj. Ankau' mi alig'is al AEL kaj helpis al la estraro per tenado de korespondado kaj varbado de novaj anoj. Tamen mi sukcesis allogi miajn etulajn lernantojn de Mushqeta kaj miajn gekolegojn al Esperanto. Allogilojn estis dekomence la korespondo kun fremduloj. Tiel mia kolegino Mejte Rama el Berzhite korespondis kun geedza paro el Anglio, alia kolegino juna korespondis kun kanadiano.

Baldau' (septembre 1991) mi revenis instrui matematikon en la urbon, en mezlernejon . Tie nature mi varbis plurajn miajn gestudentojn al Esperanto per lernokurso senpaga kaj korespondo. Mi ec' arang'is ekskurson de 18 gejunuloj al Vraca te Bulgario au'guste 1992. Interalie la grupo estis akceptita kaj akompanita tie ankau' de s-ro Ljubomir Trifonc'ovski, log'anto de Vraca. Tio efikis notinde. La grupo en la lernejo starigis junulan klubeton kiu tuj agnoskig'is de TEJO kiel branc'o por Tirana de Albana Esperanto Junularo.

Ni kune faris c'ion eblan por plivastigi la interrilatojn de nia AEL kun eksterlando , aparte kiam mi elektig'is ties estrarano por la eksteraj rilatoj. Kune kun la nova prezidanto , s-ro Vasil Pistoli en la jaro 1993 ni starigis lernokursojn en Universitato, en aliaj mezlernejoj, en Pedagogia Mezlernejo , en Fremdlingva Mezlernejo , en ec' elementaj lernejoj . La samon ni postulis al niaj samideanoj de Durres, Lezhe, Kukes, Pogradec, Peshkopi , ka.

Ni sukcesis eldoni revueton kaj poste Bultenon dumonatan, enalbanigis filozofian verkon de s-ro Bruno Vogelman "La Nova Realismo", kaj pli poste la c'efverkon de J'eliu J'elev " La Fas'ismo", verkis plurajn artikolojn por la c'iutagaj kaj periodikaj j'urnaloj kaj revuoj, partoprenis intervjuojn en la tutlanda Radio kaj TV - stacioj.

G'is nun estas kompilitaj kvar lernolibroj de Esperanto por albanoj (kun au'toroj s-roj Vasil Pistoli, Zef Mjeda, Bardhyl Selimi, kaj Gjergji Gusho). Estas kompilita ankau' vortaro duvoja por la unuaj bezonoj kaj estas kompilata granda vortaro (g'is nun oni atingis g'is la dek unuaj literoj).

**Niaj gestudentoj esperantistaj**

Sendube plej granda atingo de nia enlanda movado de E. estas la pretigo de kvalifikitaj esperantistoj danke al la STUDUMO c'e Monda Turismo, same klerigejo de Akademio Internacia de la Sciencoj AIS. Ekde la kajo 1997 partoprenis tiun studumon kelkdekoj da gestudentoj el Tirana, Elbasan, Pogradec, Vlora, Kukes, Skrapar ka. Parto el ili jam bakalau'rig'intis kaj dau'rigas siajn studojn por magistrig'i c'e AIS. Kelkaj el ili akiris postenojn en la turismaj institucioj de la lando. Certe ili estas bona fundamento por E-instruistaro en Albanio.

Malpli da studentoj sekvis la E-kursojn c'e la Karlskoga universitato gvidataj de s-ro Lars Forsman , kaj laste intencas sekvi kursojn en karlovo de Bulgario gvidataj de s-ro Boj'idar Leonov.

**Statististikaj'oj**

Rezulte de la agado de AEL kaj ties organizaj'oj (ILEI-sekcio, Albana Esperanto-Instituto, AEJ ks) la nombro de esperantistoj en Albanio kreskis notinde.

Reviziante lastatempe la nomlistojn de ekskursanoj g'is printempe 2001, kaj de la lokaj Esperanto-societoj, mi sukcesis fari el tiuj plenan nomliston kun personaj donitaj'oj de esperantistoj vivaj en la jaro 2001.
Jen kelkaj tabuloj:

**Tab.1 La nombro de esperantistoj lau' distriktoj:**

| Distrikto | Nombro | % |
|---|---|---|
| Bulqize | 2 | 0.4 |
| Burrel | 2 | 0.4 |
| Çorovode | 3 | 0.6 |
| Durres | 68 | 14.2 |
| Elbasan | 5 | 1.04 |
| Fier | 4 | 0.8 |
| Gjirokaster | 1 | 0.2 |
| Gramsh | 2 | 0.4 |
| Kruje | 1 | 0.2 |
| Korçe | 3 | 0.6 |
| Kukes | 2 | 4.2 |
| Kurbin | 3 | 0.6 |
| Lezhe | 4 | 0.8 |
| Librazhd | 4 | 0.8 |
| Lushnje | 4 | 0.8 |
| Mallakaster | 2 | 0.4 |
| Permet | 2 | 0.4 |
| Peshkopi | 7 | 1.45 |
| Pogradec | 14 | 2.9 |
| Puke | 2 | 0.4 |
| Sarande | 2 | 0.4 |
| Shengjin | 2 | 0.4 |
| Shijak | 28 | 5.8 |
| Shkoder | 4 | 0.8 |
| Skrapar | 2 | 0.4 |
| Tepelene | 3 | 0.6 |
| Tirane -urbo | 262 | 54.6 |
| Tirane -vilag'o | 10 | 2.1 |
| Tropoje | 2 | 0.4 |
| Vlore | 9 | 1.9 |
| Log'loko ne konata | 7 | 1.45 |
| **Entute** | **480** | **100** |

**El tiuj :**

| | | |
|---|---|---|
| Inoj | 292 | 60.8 % |
| Maskloj | 188 | 39.2 % |

**Averag'a ag'o**

Prikonsiderante la donitaj'ojn de nur 298 esperantistoj ni povas doni la jenajn ag'grupojn:

| **Ag'o** | **Nombro** | **Procento** |
|---|---|---|
| 75 | 1 | 0.3 |
| 68 | 1 | 0.3 |
| 57 | 1 | 0.3 |
| 56 | 2 | 0.6 |
| 53 | 1 | 0.3 |
| 50 | 1 | 0.3 |
| 49 | 1 | 0.3 |
| 44 | 2 | 0.6 |
| 45 | 1 | 0.3 |
| 43 | 1 | 0.3 |
| 42 | 1 | 0.3 |
| 39 | 2 | 0.6 |
| 37 | 3 | 0.1 |
| 36 | 3 | 0.1 |
| 33 | 1 | 0.3 |
| 32 | 6 | 1.9 |
| 31 | 3 | 0.1 |
| 30 | 10 | 3.3 |
| 29 | 11 | 3.6 |
| 28 | 7 | 2.3 |
| 27 | 15 | 4.9 |
| 26 | 23 | 7.5 |
| 25 | 28 | 9.1 |
| 24 | 54 | 17.6 |
| 23 | 17 | 5.5 |
| 22 | 43 | 14 |
| 21 | 22 | 7.2 |
| 20 | 17 | 5.5 |
| 19 | 9 | 2.9 |
| 17 | 2 | 0.6 |
| 16 | 9 | 2.9 |
| entute | **298** | **100** |

Tial la averag'a ag'o rezultig'as **25.5** jara.

**B. Selimi**

## EL LA LETEROJ

- **Karaj Artemisa kaj Bukurie**

**(**Letero al blindaj gekursanoj)

Kun granda g'ojo mi ricevis viajn leterojn, skribitajn en la internacia lingvo, al mi kaj espereble ankau' al vi tiom kara! Mi tre dankas al vi, c'ar mi s'atas havi geamikojn en la bela lando Albanio, kiun mi tiom ofte vizitis.

Jes , karaj, ankau' mi kun vi malg'ojas pri la subita kaj tragika morto de s-ro Ramazan Kabashi, pri kies forpaso informis min via estimata instruisto s-ro Bardhyl.

Eble vi scias ke mi estas iom pli ag'a ol vi. Mi havas malantau' mi jam sepdek jarojn, sed danke ankau' al Esperanto mia koro restadis juna kaj fres'a. Mi vere povas konfesi al vi, ke sen tiu lingvo kaj sen tiu mondvasta movado mi vere ne povus felic'e vivi surtere..Nu c'ie en la mondo mi havas bonajn geamikojn, nun ankau' en la for a kaj rigardinda lando Srilanko. Nia malgranda organizaj'o klopodos plivastigi la tro malgrandan instituton por blindaj infanoj "Vaazhvaham" en Chunnakam (Jaffna provinco) . Kim ni estis en tiu hejmo, la infanoj plej c'armaj prezentis al la gastoj el Nederlando belegan programon de kantoj, dancoj kaj deklamoj. Ni ege g'in g'uis!

Dum la venontaj semajnoj mi devos helpi al la pretigo de centoj da lau'receptaj okulvitroj por la plej malric'aj homoj en la norda parto de Srilanko. Flanke de tio mi devos prepari vojag'on al Moldavio sen majo venonta. Tiam teamo de kvin personoj vizitos c'iujn malliberejojn en tiu lando. Nu, ni povas garantii al vi ke vivo en tiuj inferaj ejoj estas ege malagrabla kaj malloga!

Restas al mi varmkore saluti vin, viajn samfamilianojn, viajn kunstudentojn, viajj instruistojn kaj prizorgantojn, vian direktorinon Marjana, kaj nelaste vian karegan docenton Bardhyl. Ke vi montru vin diligentaj gelernantoj, por ke ankau' por vi Esperanto plilarg'igu vian horizonton kaj kreskigu vian amikaron mondvaste!

Plej kore viaj, ankau' en la nomo de mia amata edzino Vera, kiun mi ekkonis en 1958 kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio ( Pollando). Amike viaj

**Jacques Tuinder**

**Heemskerk, 27-an de marto 2003**

Letero de David Kelso

- Unue, mi dankas pro la regulaj ekzempleroj de via bulteno kiujn mi ricevis kaj kiujn mi (almenau' parte) legis. Mi diras "almenau' parte" c'ar ili estas sufic'e longaj, c'u ne? S'ajnas al mi ke vi albanoj povas toleri pli da legado ol ni mallaboremaj okcidentuloj, c'u ne? En Britio hodiau' (kaj Usono, al mi s'ajnas)c'io estas mallongigita, malpezigita, por kurag'igi la atenton ...... ?! Ec' niaj "seriozaj" gazetoj estas sufic'e malpezaj. Same la BBC (interese, mi au'skultas la "World Service" (tutgloba servo) de BBC frumatene, antau' ol komencig'as la enlanda servo, kaj mi rimarkis ke g'i (la World Service) estas ankorau' pli serioza ol la enlanda servo .....)

Mi ne babilu nun c'ar, kiel kutime, mi ege okupig'as, sed vi eble interesig'os au'di ke mi intencas eklog'i en Suditalio ek de septembro! Mi diplomatig'os pri instruado de la langla lingvo al alilingvanoj en au'gusto kaj intencas ekvojag'i al italio en septembro...... ?!

Mi aktuale legas ege interesan (anglalingvan) libron, "Falconara", verkita de usonanino pri s'ia gepatra familio (Musacchio, el albana "Muzaka"?) kaj la arbares'a vilag'o en Italio de kie ili devenas, Falconara Albanese, en la provinco de Cosenza (Kosenca). S'i multe esploris la temon kaj priskribas kiel la albanoj alvenis en Italio: ege interese. C'u la nomo Muzaka ankorau' trovig'as en Albanio? en kiu regiono? Se vi havus iun interesan informon pri konataj modernaj familianoj Muzakaj, eble mi informos la au'torinon, pere de la eldonisto en Usono?
Nu, mi reiru al la laboro. Mi promesas, mi promesas, ke iam baldau' mi faros veran leteron, por priskribi lian lastatempan vivon kaj pensojn. En Kalabrio, eble, mi havos pli da tempo por legi, verki, leteri, ec' pensi esperante. Ni esperu. C'iajn amikajn bondezirojn el via skotlanda amiko .....
"Katundi me ishe shume i bukur" [el la libro - c'u albanlingva au' arbares'a?] -
**David Kelso Britio, la 16-an de aprilo, 2003**

Letero el Francio

- Kara amiko, revenante de sudo de Francio post kongreso de SAT-amikaro mi trovas viajn paskajn bondezirojn. Koran dankon kaj reciprokajn bondezirojn por vi, via familio, kaj via valora poresperanta agado kiun mi sekvas de malproksime. Mi j'us eniris mian 84-an jaron kaj iel malesperas pri nia mondo kiu dau're estas viktimo de mensomanipulado. C'u iam homoj konscios ke ne eblas kaj estus malric'ig'o de la tuta homaro se anglosaksuloj devigus la mondon je adopto de la angla kiel internacia lingvo, c'u vere necesas pruvi ke tiam estus nova , raso de senjoroj kiuj sen speciala laboro kaj kun totala aroganta ignoro de aliaj kulturoj kaj lingvoj povus regi en c'iuj internaciaj kunvenoj. Pro tio via laboro estas esenca kaj meritas gratulojn.

Plej samideane kaj amike via,
**Maurice Sujet, 27-an de aprilo 2003**

- **Helena Esperanto –Asocio sciigas:**

Helena Esperanto-Asocio fiere anoncas la aperon en majo 2003 de la nova verko de Spiros Sarafian. Temas pri 1225 pag'a Greka _Esperanto vortaro ( tri volumoj) enhavanta pli ol 70 000 vortojn kaj 279 pag'a Esperanto- Greka vortaro enhavanta preskau' 16 000 radikojn. Pluajn informojn bonvolu peti c'e HEA espero@otenet.gr
**Informis rete esperan@otenet.gr**

- Mi dankas vin pro via reago c'e la forpaso de mia edzo Hans. Estis bone ricevi de multaj flankoj reagoj.. Dankon

## Els ten Hagen

**<u>Kontribuaj'oj de niaj fremdaj geamikoj</u>**

**Meditigaj pensoj kaj diverstradiciaj preg'oj por la Dimanc'amatena Kunveno**

- C'iu infano enmondig'as kun la mesag'o , ke Dio ne malesperas pri la homo (Rabindranath Tagore, 1861-1941)
- La mondon ne postlasis niaj gepatroj, sed g'in pruntedonis niaj infanoj (Afrika proverbo)

- La bonon kiun mi faris por aliaj mi severe kas'os, kaj la bonon kiun aliaj faris por mi, mi c'ie disrakontos ( Imamo Ali Iben Aboe Talib, c'. 600-661)
- La tagoj alportas plejmmulton al tiuj, kiuj amoplene agas (tradicia jainisma proverbo)
- Kiu pacon ne trovas en si mem, tiu ne penu g'in serc'ante aliloke (lau' F. de la Rochefoucauld 1612- 1680)
- Ekzistas nur unu momento en la tempo, en kiu ni necese vekig'u. Tiu momento estas la nuna (Budao, c'. 563- 483 a.K)
- Perloj ne trovig'as sur la strando; avidante perlon, vi subakvig'u ! (orienta dirmaniero)

**Kolektis Jacques Tuinder, aprilo 2003**

## Intervjuoj

**C'u Serbio vere demokratiig'as?**

(Lau' opinioj de albana politika analizisto el Kosovo, s-ro Adem Demac'i, prezentitaj al serba j'urnalo en Vojvodino, decembre 2002)

Demando: S-ro Demac'i, kia estas via opinio pri Serbio aktuale, c'u g'i vere demokratiig'as?

Respondo: Mi opinias ke la politika situacio en Serbio estas malplibona ol , ni diru antau' la 5a de oktobro 2002, t. e. antau' la g'eneralaj balotoj okazintaj tiutempe. Mi povus aldoni ke ankau' la pozitivaj procesoj, ekestig'intaj antau'e estas haltig'intaj nuntempe. Ne okazis tio ege esperebla de ni c'iuj , c'ar ankorau' oni klopodas trovi malrektajn vojojn por haltigi la procezon de transformado kaj reformado, ankorau' oni estas savantaj la homojn kiuj konsistigis la kontingenton de la reg'imo de Milos'evic'. La plejparto de la infrastrukturo de Milos'evic' ankorau' notinde influas en la politikan vivon de Serbio hodiau'a. C'i tie inkluzivig'as intelektuloj, j'urnalistoj kaj politikistoj. Se nun ili esprimas prudentecon , tion oni faras ne sincere, ne elkore. Ili mem ne kredas je tio kion ili diras , do ne ekspektas ke aliuloj kredu ilin. Kreig'as atmosfero: ja , ni jam transpasis la malplejbonan, la mondo akceptis nin tiaj kiaj ni ja estas , tial ni povas ne s'ang'igi. Ek al la estig'o de tio kion ne estigis Milos'evic' . Kvazau' tiu lasta estis venkita ne pro sia politiko mem sed pro la misapliko de sia politiko.

Demando: Kion ne jam faris la novaj serbaj s'tatotenculoj?

Respondo:Por estigi fundamentajn s'ang'ig'ojn en Serbio , oni devus haltigi la aktivecon de kelkaj partioj kiuj pretigis kaj promovigis la militon kaj la krimagojn, kiu semis kaj dissendis la etnan kaj religiecan malamon. Tio ne signifas ke oni nepre devas senkapigi certajn homojn, sed almenau' , multaj tiaj devas forig'i disde la institucioj de la s'tato kaj de influado al la publika opinio. Nur tiel oni povas aliri al kunfrontig'o kun la vero pri si mem kaj la aliuloj. Sed tiaj kunfrontig'o ankorau' ne videblas en Serbio, c'ar trikvaronoj de la log'antaro ankorau' sin decidemas kontrau' la s'ang'ig'o de la konscio, kaj insistas por ke dau'rigu la saman celvojon sed per aliaj rimedoj.

Demando:Do, estas ia fermita cirklo, sed kiamaniere oni povas eskapi g'in?

Respondo: Post krizoj estas c'iam malfacile eskapi la fermitajn cirklojn sed la insisto de personecoj kiuj defendus iliajn principajn sintenojn ec' je la prezo de politika marg'inilazig'o, ks. Tion devas fari ne nur politikistoj , sed ankau' intelektuloj , ec' la aktivaj civitanoj. Estas problemo c'u inter ili estas au'daculoj kaj bravuloj. En Serbio la publika opinio estas formig'anta notinde de masmedioj, kontrolataj plejparte de la samaj iamaj homoj, s'a'ngintaj nur la formon kaj la vortaron sed ne la enhavon.

La junaj homoj kaj tiuj kontrau'starantaj la reg'imon ne havas ankorau' ian influon. Do ankorau' ne okazis la katarsis-o, c'ar la plimulto de la serbaj civitanoj ne konas la veron pri tio okazinta en c'i tiu spaco. La vero estas kas'ig'inta, kaj surface oni dau'rigas la retorikon kvazau' la serbaj fortoj en Kosovo faris sian devon c'ar tie ili militis kontrau' la albanan s'ovinismon, kiu mortigis serbojn.. Ankau' hodiau' oni misprezentas la realon en Kosovo, , la pasinton kaj la hodiau'on. Kvazau' ili volas diri ke: la tuta mondo staras kontrau' nin, ni estas devigitaj cedi, sed ni scias kiel agi envere. Tial mi opinias ke la situacio estas senesperiga kaj nur la internacia faktoro povas influi por s'angi tian pemsmanieron.
Demando: Kiamaniere?
Respondo: La internacia komunumio disponas pri rimedoj kaj meh'anismoj por influi por ke la s'ang'ig'oj en Serbio estu au'tentikaj. La situacio nun estas s'ang'ig'inta, c'ar kompletig'inte NATO-o, Serbio estas c'irkau'ita de c'iuj randoj kaj ne povas fari tion kion g'i jam estas farinta dum la pasintaj 15 jaroj. Sed la internacia komunumo ne hastas , vers'ajne, g'i sin okupas aktuale per dolc'aj problemoj de superevoluado. Cetere en Balkanio interplektig'as sendube la interesoj de multaj s'tatoj kaj potencoj Jen, vidu kian toleron montras ili al Serbio nur por savi la bonajn interrilatojn kun Rusio kaj C'inio, ec' kun Francio. Tion la serbaj politikistoj estas ekspluatante maksimale. Kial do oni premas al la malgranda Montenegro por pluresti kun Serbio kaj ne estig'i samkiel aliaj sendependa ? Mi opinias ke tion oni faras por ke poste postulu ke ankau' Kosovo plurestu kun Serbio. Al kiu servas tio? Ni bezonas pacon, evoluon, kunlaboron ne artefaritajn s'tatojn.La malgrandaj popoloj c'iam estis predaj'o de troaj postuloj kaj projektoj de diktatoroj kaj diktatorac'oj diversaj regintaj en tiu c'i spaco. Tial albanoj ne kredas kaj estas tre atentemaj.
Demando: Kiel pensas vi, kiamaniere oni povus solvi la problemon de Kosovo en la pasinto kaj kiel g'i povas solvig'i nun?
Respondo: Se ekzistus pli da volo, se ne ekzistus la serba hegemonismo, la problemo estus facile solvebla. Ekde en la jaroj 1970 respektante la volon de la plimulto de albanoj oni devus deklari Kosovon respubliko, do liberigi g'in de la ungegoj de Serbio. Oni ne devas forgesi ke Milos'evic' starig'is pro Kosovo Tiu lasta ekfajrigis tutan Jugoslavion. Se g'i estig'us respubliko la serba hegemonismo senig'is je grava subteno kaj ne povus fari tiom multe da nigraj'oj. Dume Serbio sin okupus per sia demokratiig'o. Tiel Kosovo estas frustiginta la tutan serban nacion.
Mi kutimas rakonti anekdoton jenan: En Afriko por kapti la simiojn oni enmetas en mallarg'gorg'an poton multajn avelojn kaj atendas. La simio enmetas la manon en la poton kaj klopodas kapti kiom multe da aveloj , sed pro tio li ne povas eligi plu la manon el la poto. Li ne komprenas kaj ne volas ke li devas malplenigi la manon unue au' preni la avelojn unu post la alia. Sed li volas la tutan kvanton tuje.
Tia sindromo de simio okazas ankau' al la nunaj politikistoj. Kiam ili kaptas la s'tatpotencon ili ne volas lasi la avelojn je kiu ajn prezo, ec' je la prezo de ilia kapo , ec' je prezo de la alies vivoj. Tio estas pruvita unuavice c'e komunistoj. C'iuj avidas la s'tatpotencon, sed komunistoj estis pretaj fari c'ion por g'i! Finfine pro tio la Jugoslavio ne dividig'is enpace..
Se la disdivig'o okazus enpace c'io estus pli bone.

**Kosovo kaj Serbio sur la vojkrucig'o**

(Dua intervjuo kun s-ro Demac'i originala por MONATO, vidu junian numeron, pag'o 8, ricevita antau' la mortatenco de G'ing'ic)

**Demando:** C'u Serbio de la epoko de Milos'evic' diferencas notinde de la Serbio de Kos'tunica kaj G'ing'ic'?

**Respondo:** Rigardate superflue kaj formale s'ajnas ke jam okazis grandaj s'ang'ig'oj, sed rigardate profunde kaj objektivece envere oni povas konstati nur malmultajn s'ang'ig'ojn. Tiel, c'ekape de Serbio ne plu estas Milos'evic' kaj S'ehs'el kaj iliaj ekstremnaciemaj kaj s'ovinistaj partioj. Oni senpostenigis en la armeo kaj polico kelkajn personojn. Same en la gvidantaro de kelkaj medioj oni anstatau'is kelkajn personojn. Sed la alvenintojn c'ekape de la serba politiko estas s'ang'intaj nur la taktikon, ne la hegemonistan strategion de la serba politiko.. Tiuj gvidantaj hodiau' Serbion, antau' sia opinio kaj tiu internacia, klopodas kas'i kaj minimizi la krimecojn de la reg'imo de Milos'evic', dume ili malkas'as sian apetiton por rekoloniigi Kosovon kaj dau'rigi la duonkoloniecan jugon de Belgrado sur Montenegron.La militistaj-policistaj meh'anismoj kaj la industrio de armado de Serbio plurestis netus'itaj. Serbio denove ekvendas armilojn enmonde. La serba reg'imo sin okupas nur per politika lips'mirado hezitante lanc'i esencan kampanjon por profunde s'ang'i sian krimecan kaj mafiecan politikon. Se ni volus ilustri la supre diriton necesus sufic'e multe da spaco.

**Demando:** Kion jam alportis kaj povas alporti la fondig'o de la nova s'tato Serbio & Montenegro por serboj mem kaj iliaj najbaroj?

**Respondo:** Tio reprezentas alian ekzemplon kiel la grandaj s'tatpotencoj de la mondo, pro iliaj propraj interesoj, kapablas oferi la interesojn de la malgrandaj popoloj (c'ikaze tiujn de la malgranda montenegra popolo).Vers'ajne, tio pludau'rigos ankorau' por kelke da tempo la vivon de la serba hegemoniismo en Balkanio, lasante malfermita la vojon al novaj krizoj en tiu c' regiono. Tio postponigos je nedifinita tempo la necesan kunfrontig'on de Serbio al si mem. Tio malfruigos la procezon de demokratiig'o c'ar g'i plifortigos la apetiton de Serbio rilate Kosovon kaj la iluziojn de tiu s'tato por ludi pli grandaj rolojn ol g'i kapablas reale por tiu celo.

**Demando**:Kiel vi komentas la deklaraj'ojn kaj la postulojn de G'ing'ic' por revenigi la serban policon en Kosovon kaj fondig'on de serba s'tateto en Kosovo?

**Respondo**: Tio estas plia argumento ke Serbio estas nag'ante ankorau' sur lamalpuraj akvoj de la politiko de Milos'evic'. La plej nova politika ofensivo de G'ing'ic' rilate Kosovon, devas ricevati kiel serioza avertig'o al la mondo ke la serba politiko esence, plurestis tiu estinta kaj ke la dang'ero de novaj sangovers'oj en tiuj c'i spacoj ankorau' ne estas forigita. La fondig'o de serba s'tateto sur la grundo de Kosovo estas ja plia argumento ke Serbio startigis la disdividon kaj dispartigon de Kosovo ekspluatante la sinsekvajn tolerojn al g'i fare de Eu'ropo kaj Usono kiuj forgesas kaj pardonas al Serbio g'iajn faritajn sennombrajn krimecojn g'is hierau'.

**Demando:** Kiamaniere Serbio povus demokratiig'i kaj kian profiton ekhavus mem serboj kaj iliaj najbaroj pro tio?

**Respondo:** Serbio povus demokratiig'i nur se g'i rezignacius de Kosovo kiel sian kolonion kaj Montenegro kiel sian duonkolonion rekonante ties kompletan sendependecon. Same, nepre, g'i devas transformi en federaciajn unuojn la serban Vojvodinon centre en Novi Sad, la hungaran Vojvodinon centre en Subotice kaj la bosnian Sandj'ak-on centre en Novi Pazar. El tio serboj profitus la maksimumon. Ili,

post tio, ne plu bezonus havi grandan armeon, nek grandan policon kaj tiel eskapus de troaj elspezoj. La paco en la regiono ekstabilig'us definitive.
**Demando:** C'u Eu'ropo pensas serioze pri demokratiigo de Serbio?
**Respondo:** Se ni prikonsideras kiel g'i agis g'is nun kaj kiel g'i estas agante aktuale, mi pensas ke ne.
**Demando**: Kion vi pensas pri la estonto de la interrilatoj Serbio-Kosovo?
**Respondo**: Post multnombraj malgrandaj kaj grandaj malfacilaj'oj kiujn ni ekspektas, nepre, alvenos la epoko de tutegala kunlaborado, reciproka respektado kaj kreativa najbareco.
**Demando:**Kiel vi prijug'as la lastajn arestojn de la eksaj gvidantoj de UÇK (Liberiga Armeo de Kosovo). C'u tiuj atestas pri ia toleremo al Serbio kaj
preparo por "restarigi ties suverenecon" sur Kosovon?
**Respondo:** G'uste estas tio kio estas jam supozita de vi.

# BELETRO

## Ismail Kadare

**C’u la homaro bezonis la beletron?**

(prelego en la Konferenco de la Monda Forumo por Beletro en Munkeno, je 22an de marto 1992)

C’u la homaro bezonis la beletron? Eble ni ne rajtus demandi tiel, imitante la nekapablajn animulojn de TV kiam ili klopodas vivigi senenhavan konversacion, kvazau’ la demando ne estus farita jam ekde miloj da jaroj antau’e. Estas sciite ke ekzistis du kontrau’aj lobioj.: favore kaj malfavore al la beletro.
La beletro, estas do naskig’inta kune kun sia maljeso, kun ia baro. Kvankam unuavide tio aspektas io stranga, se ni iom pripensig’us certe ni konkludus ke tia negacio konvenas al la beletro, ec’ tute nature. Negacio kaj la beletro estas ja samrasaj. Kurte, pli ol al la angelo , la beletro emas al la diablo.
Ni ekrigardu c’ion per plej simpla maniero. La beletro, tio estas, la unuaj oralaj poemoj havas kutime kiel subjekton la revenon el longa vojag’o, la rakonton pri tio kio estas okazinta tie, fore, je la landlimoj de la s’tato, la dezerto au’ la morto.
La unuaj vojag’intoj revenintaj de fore estis praktike ankau’ la unuaj verkistoj. Alpas’ante al sia lando, dum la soleco de la vojiro, ilia menso ellaboris la okazintaj’ojn tiamaniere ke dum la rakontado ili estu plej interese por la au’skultantoj. Tiel, dumvoje estig’is la dialogoj, renovig’is la okazintaj’oj, pliintensig’is la koloroj, pliakcentig’is io kaj la cetero forvis’ig’is.
Sed kvankam la vojag’intoj kunportis la okazintaj’ojn, ties herooj estis plejofte fore. Ili kutime malc’eestis, estis c’iam transe, trans la landlimo de la s’tato kaj , kutime, trans la vivo, tio estas, estas mortintaj.
Tiel, ekde la komencig’oj de la beletro, la malc’eesto kaj la morto elokupis la honoran postenon. Sed la beletro eniris en la domajnon de la morto ne por al g’i subig’u, kontrau’e, por ke estu tutegala kun g’i. C’e la majesta poemo pri Gilgames’o, la beletro , rekonante la potencon de la morto, ricevis tamen la rajton por g’in riproc’i kaj admoni. Gilgames’o malvenkas antau’ la morto, sed danke al la beletro, ties parto forkuras,

eskapas tamen de la morto. Estas ja tio, ia kompromisaj'o, se ni uzas formulon de nuntempo. Tiajn grandajn kompromisojn kun la maleblo povus fari nur granda arto.
La beletro dau'rigis nutrig'i per la morto kaj ties subproduktaj'oj: nokto, dormo, song'o, konsci-suferado.
La beletro ekde g'iaj komencig'oj sin ligis al la akto de sinofero. Trojo estis g'ia unua postulo en tiu c'i altaro. Poste estis je centoj la eventoj, subjektoj, personag'oj kaj scenoj kiuj antau' ol nutri la beletron estis surs'utitaj per la sango kaj la funebro. Kiam la albana poeto Fan Noli tradukis "Waterloo-n" de Hugo, li notis je la ties fino, ke post tiu tragedio ni havas almenau' tiun c'i poemon kiu ne povis naskig'i sen tiu tragedio.
Labeletro alkutimig'is S tiel postulante sinoferojn. Iamaniere au' alie g'i postulas nin. Iamaniere au' alie ni pagas al g'i tributon.
La morto, la dormo, la konsci-sufero, c'iuj c'i tiuj rememorigas al ni pri la morto. La nokto, en la skiza homa meditado ligig'as al la negacio. Sed ni mencias tion facilanimece, ne pensante pri la teruro kiu ekregus en la mondo, se la nokto ne c'esus. Se la tuta kalendaro konsistus nur el senfina tago. Neniu, do, ne estas rememorinta g'is hodiau' realigi hipotetikan studon pri la rolo ludita de la nokto por plimildigi la homaron. Sen ties intervento, sen la bremsado, ties c'esado, la galopado de la malbono, nervozismo kaj homa furiozo kaj rabieco atingus katastrofecajn ritmojn.
En la unua periodo la beletro ne konis alian ol tiujn dang'erojn kiuj minacas la homan pacon: forgesecon, estingig'on. La rapsodoj kantis, la homoj au'skultis, poste aperis novaj rapsodoj kiuj kantantis novajn kanzonojn, kiuj mortis kune kun ili au' iom pli malfrue. La beletro konis tiel pli malpli tiujn naturajn dang'erojn, samkiel la homa vivo. Poste g'i ekkonis la unuan dang'eron alveninta el alia sfero: el socio, s'tato. Estis la teatro, vers'ajne kiu pro la arig'o de homoj je la urbocentro, provokis unue la ideon de la cenzuro.
La oficiala cenzuro naskig'is tiel, du mil kvincent jarojn antau'e kaj estis tiom potenca kiom g'i kau'zis multajn malagrablaj'ojn ec' al tiuj kolosoj kiaj ja estis la grandaj tragikuloj.
La cenzuro interrilatas al la skribo. Antau' ol kiam akkado- sumeroj estas inventintaj la skribon , la kontrolo de la orala poezio povis esti nur ne preciza kaj nepersista. Multe, multe nekonfomema rapsodo povus esti ne invitata por kanti en la festomang'o de princo kaj la afero finig'us ci tie.
Kiam en la horizonto de la monda kulturo ekaperis la skribo, tio estis envere neimagebla tertremo.
La skribo estis duobla mas'ino. Unuflanke, g'i malfermis novan horizonton al la beletro, aliflanke g'i frostigis g'in, mortigis kaj mumiigis tion.
Antau' nova fazo de evoluo, la beletro lau' ties severa kanuno, postulis de verkistoj pezan tributon. Ili devis fordoni parton de ilia spontaneeco, trapasigi la penson sur la radetojn, rimenojn kaj pezan mas'inon de la sintakso. Ili nun ne povis riproc'i g'in facilmaniere, c'iu Dian tagon, lau' ilia spirita stato. La skribo estis duobla kontrolo. Kontrolo de ilia konscio, ilia responseco antau' la tempo, sed ankau' oficiala kontrolo.
La historio de la skribo estas unuavice, la historio de endang'erigo de verkistoj.
Kelkaj nuntempaj esprimoj ligataj al tio, kiel "tiu beletraj'o povas vin forbruligi" au' "povas trafi vin kiel malfelic'ajon", farig'as mirinde klaraj, se ni meditas pri la argilaj platoj sur kiuj la sumeroj estas skribintaj iliajn pensojn. Kiam la verkisto eligis la bakitajn platojn el la forno malatente, li povis bruligi liajn manojn. Au' beletraj'o, ni

supozu, longa rakontaj'o, povis enmetig'i en la verkista studejo je murformo kaj unutage , pro neatenta lokig'o de la platoj, malbona bakado au' tertremo, la verko povis enfali kaj surpremi ec' la verkiston mem.
Sed kiel c'io primitiva, ankau' tiuj c'i estis nur simplaj dang'eroj, kompare al la aliaj alvenontaj poste. Kaj poste alvenus la teruraj'oj kiujn ni jam konas bone.
La foriro de Eskilo de Ateno malfermus la serion de grandaj foriroj. Eskilo kaj Homero estis plej grandaj verkistoj de la homaro g'is la kvina jarcento. Tiel almenau' unu el tiu duopo de plej grandaj verkistoj estis devigita forlasi la landon. ( mi diras almenau', c'ar oni ne povas ekskludi la eblecon ke Homero, kiel vaganta rapsodo, estis movig'inta tiom longe kiom por li la vorto foriro ne havis plu ian sencon en lia vivo).
La foriro au' la forpelo de verkistoj konjektig'is tiamaniere kun la beletro, eniris kiel diri en ties genetikan kodon sufic'e frue. Sed la foriron trafis s'ang'ig'oj dum jarcentoj. Dum la tempo en la mondo fojfoje plimildig'is, la sinteno al la beletro plikruelig'is.
La foriro de Ovido de Roma s'ajnas al ni eble plu doloriga, c'ar , alie ol c'e Eskilo, kie la c'efan rolon por la decido de foriro ludis la kolerig'o de verkisto mem, Ovido estis forpelata de la s'tato. Kun Ovido komencig'as la internigo de verkistoj je la hodiau' senco de la vorto.
Je la okazo de Ovido ni havas jam c'iujn signojn de la venonta totalismo: la kondamnon sen deklarita motivo. Tio estas , tiun specon de la premo far de la totalisma s'tato, kiam ec' vi ne estas klara kial oni estas kondamninta vin. Tia maleksplikebla teroro, tia blinda frapo plurestus unu el la c'efaj mas'inoj de la teroro dum la XX jarcento, kiam komunismo, perfektiginte la mas'inon, samtiel kiel en la mas'ino de Kafka, elfalos kune kun g'i.
Per iliaj foriroj, la grandaj verkistoj, ekde Eskilo g'is Dante Alighieri, s'ajnas kvazau' ili postulis iamaniere reveni en tiun areon, en tiun klimaton, en tiun h'aoson de kie estis naskig'inta la beletro. Alivorte, ili volis provi alian ties staton, ian duonmorton, por ke ne diru la morton mem. G'i estis, eble, ia interna ordono de la arto, de g'ia granda rito sugestinta al Dante ke antau' ol starti la priskribon de la vojag'o tra la infero, li devis foriri iamaniere de la vivo.
Tamen, direndas ke g'is Dante Alighieri, verkistoj, ec' en malfelic'eco, estis traktataj g'enerale kiel sinjoran rason. Estis ja la postaj diktaturoj tiuj kiuj komprenis ke por pli bone frapi ilin, oni devus malaltigi ties rangon. Tiel ekkutimig'is tio kiu antau'e s'ajnis kiel eksterordinara: la enprizonigo de verkistoj , enkonduko de ili en komunajn karcerojn, internigo, malhonorigo, translokigo per trajnoj de koncentrejo al koncentrejo, ofendoj, reedukig'o per laboro ktp..ktp.
La komunisma ordo estis tiu kiu pli multe ol kiu ajn alia ordo sin okupis serioze en la batalo kontrau' la beletron. Kamunismo kaj la vera beletro ne povis kunvivi iam ajn. La neiga sinteno al la beletro ne estas pli posta deformig'o. G'i ja estas en la genezo de komunismo. La superfluaj paragrafoj de Markso pri la antikva beletro au' pri S'ekspiro estas nur ia alibio por kovri la pli postan krimecon. En lia vizio pri la estonta mondo ne estas loko por la beletro. La artikolo – pamfleto de Lenin " La partia beletro kaj la partia organizaj'o" estis tiom barbara pro ties dimensioj, kiom g'i povus havi masupre la signon de G'inghis Khan mem. Sed ekde la artikolo de Lenin g'is la mortpafoj de Stalin, g'is patologia malamo de Mao por verkistoj, g'is Pol Poto de Kambodj'o, kiu murdis tutegale kiel tiujn kiuj verkis librojn, tiel tiujn kiuj legis librojn, trapasas kiel rug'an fadenon la sinteno al la beletro.

La totalismo estas kompreninta same, ke la detruo de beletro povus estig'i nur per teroro. G'i komprenis ke ne la neniigo, sed la memneniigo, mempereo de beletro estus la kompleta solvo de la problemo.
La totalisma komunismo komencis tiel unu el la plej krimecaj ties agoj : la entombig'on de la beletro per la verkistoj mem. La memcenzuron, tiun jarcentan malsanon, kun kiu la beletro estas renkontig'inta ankau' antau'e kaj kiu en unu au' alia maniero estis transpasinta, komunismo klopodis transformi g'in en peston.
Kaj g'i sukcesis , iamaniere realigi tion. Miloj da verkistoj, c'efe mezkapabaluloj, c'irkau'is de c'iuj flankoj la templon de la beletro. Ilia nombro pliig'is c'iutage je tiu maso ke la nombro de la veraj verkistoj, tiuj kiuj klopodis teni viva la sanktan fajron, malpligrandig'is.
Neniam la beletro de la duono de la mondo ne estis renkontinta tian dang'eron. La verkistoj estis dividitaj tiele je du partoj: en unu parto estis ili kiuj estis perfidintaj la templon kaj en la dua parto tiuj kiuj pluestis fidela al g'i. La diina demando farebla al la verkistoj de Oriento "kion faris vi Adam ?" ricevus c'ikaze du respondojn: Unua "mi estas degradig'inta lau' la leg'oj de komunismo"; la dua "mi dau'rigis verki normale, kvazau' la komunismo ne ekzistus."
Estas dirite ankau' alifoje ke mediti normale en la freneza mondo de komunismo, estas dume ia unua rezistado. Paroli normale, tio estus preskau ia heroeca.
Komunismo falig'is ne realiginte g'ian maltau'gan revon. Ni atingis la finon de tiu miljaro sen g'i. Ekde tri mil jaroj la beletro vivas enmonde. G'ia unua miljaro estis ric'a kaj lumplena. La dua , bedau'rinde, estis malric'a. S'ajnis kvazau' la homaro volis ripozi portempe, g'is alvenis la tria jarmilo, tiu c'i travivata de ni, kiu denove revivigis la beletron. Ni esperu ke la nova miljaro, ties kvara, ne ripetu, pro fatala simetrio la duan.
**Enesperantigis Bardhyl Selimi, februaro 2003**

**<u>POEZIO</u>**

**Medito**

La iluzio de la aj'oj
Perfidas la idealon.
Ni serc'is
C'ie
La donacojn de la vivo.
Niaj deziroj ne havas limon, por niaj esperoj ne estas dimensio:
Gigantaj, monstraj
La atendoj de la koro.
Ni ne haltas
En la maltrankvila irado
G'is kiam la deziroj rompitaj
Farig'as senpotencaj stampoj
Kaj mortas la aspiroj.
Nun la rigardo pli klara
Montras al ni la trompojn
De velkintaj tagoj
Kie pompaj koloroj
Vualis povran substancon.

En la silento de la medito,
Rivelanto de vero,
La idealo dimensiigas
La homajn cirkonstancojn
Al la homa destino.
**Mario Sola**

**Sklavoj**
Deziroj buntaj, devoj grizaj.
Ni naskig'as katenitaj
Herede,
Kaj dum la vivo la katenoj
Enmordas.
Pro eduko, pro kutimo,
Enmordas
G'isoste.

**Daphne Lister**
**C'erpita el Monda Kulturo, au'tuno 1963/157**

**<u>Humur-angulo</u>**

1 Policano pridemandas du senhejmulojn:
- Kie vi log'as?
- Nenie.
- Kaj vi ?
- Du etag'ojn sub li.

2 Civitano vizitas advokaton por peti konsilon.
- Mi faris krimon kaj venas por ricevi konsilon.
- Jam estas tro malfrue.
- Sed la polico ankorau' ne trovis min.
- Do estas tro frue.

3. Du amikinoj :
- Diru al mi kial vi edinig'is al c'i maljunulo?
- Kara mia, kiam vi ricevas monon, c'u vi interesig'as en kiu jaro oni produktis la monbiletojn?

**C'erpita el Bulgara Esperantisto, januaro-marto 2003**

**<u>Eksterordinaraj'oj en Albanio</u>**

**Seksumado surau'tovoje**
Multaj el ili atestintaj pri la rara sceno, ne estus fidintaj se ili ne estus vidintaj tion propraokule. Au'to je tipo Benz je registrig'o de Tirana estas haltig'inta meze te la au'tovojo Korçe-Pogradec (Orienta Albanio), c'e la vojkrucig'o de Plloçe kaj el g'i estas elirinta geparo tute nuda kiu estas ku's'ig'inta survoje surasfalte. . Tuj poste sekvis arda

seksumado. Ambau' ne estis g'enitaj de hazardaj preterpasantoj kiuj ege surprizig'is de tio, nek pro c'irkau' 60 au'toveturiloj haltig'intaj same pro ilia kau'zo. Post kelkaj minutoj la geparo ekstarig'is kaj restante c'irkau'brakig'inta kaj interkisig'inta eniris en la au'ton kaj dau'rigis la vojag'adon.

**Geedzig'o en la jug'eja halo**

Francesko Zefi, 28 jara, akuzita pro trafiko de heroino certe estas notinta alian rekordon de Gines edzig'ante dum sesio de jug'ado kontrau' lin en la jug'ejo de Shkoder.(Norda Albanio) . La kandidatino por novedzino, Mimoza, 20 jara frau'lino eniris la jug'ejan halon akompanata de oficistino de Civila Oficejo kaj, post iom da hezitado flanke de jug'istaro, akiris la permeson por arang'i la geedzig'formalaj'ojn. Du policistoj de la jug'ejo volontulis farig'i atestantoj kaj oni plenumis c'iujn pas'ojn de la geedzig'proceduro. Fine, Francesko kaj Mimoza deklarig'is oficiale geedzojn kaj la tuta c'eestantaro , prokuratoroj, jug'istoj kaj policistoj partoprenis la g'eneralan g'ojon kaj mang'is lokumojn (lokan dolc'aj'on) tiuokazan au'gurante la novan geparon.

**<u>Eseoj</u>**

## C'U ALBANIO ESTAS "INSULO DE ISLAMANOJ" EN LA "MARO DE KRISTANOJ"?

Estas jam fakto ke la plejmulto de la albanaj etnuloj estas religie islamanoj. Lau' diversaj statistikoj en Albanio mem islamanoj konsistigas c'irkau' 70 % , dum naciskale (inkluzive Kosovon, Okcidentan Makedoniom, Parton de Montenegro kaj Nordan Grekion) albanaj islamanoj konsistigas g'is 90 % de la log'antaro albana![1]
Tiu fakto ege surprizigas la ceteran mondon en Eu'ropo kaj pli vaste. Prave kelkaj miras kiel tio okazis al la albanaj teritorioj kiuj situas pli fore de Turkio (tradicie islama nacio) ol ni diru Grekio kaj Bulgario! Plue, kial albanoj estas rezistintaj sukcese al otomanaj invadintoj estante kristanoj almenau' dum longaj jarcentoj antau' ol ili islamig'is? C'u veras ke islamig'o estas savinta iel la albanan etnecon en sia kunfrontig'o al la slava kaj greka asimilemo? [2]

---

[1] Provu serc'i verkojn de franca au'toro Natalie Claye, usona au'toro Edwin Jacques (tiu lasta titolas sian verkon "Albanoj"

[22] En sia letero de 30a de marto 2003 mia amiko el Kalifornio, s-ro Henry Studer estas skribinta: Post mia reveno el Albanio en 2001 mi ofte pripensas pri tio , kion mi vidis en via lando. Trafoliumante libron de Rand McNally ( World Facts and Maps, 200), mi ekrimarkis ke Albanio s'ajne estas "insulo de islamanoj" en "maro de kristanoj". En Albanio la elcentoj da islamanoj estas pli ol en iu ajn alia balkana lando. Lau' la libro, estas islamanoj 30 % en Makedonio kaj 40 % en Bosnio-Hercegovinio. Sed en Albanio 70% estas tiaj. Pro tio ke Albanio estas pli for de Turkio ol Bulgario oni eble atendus pli da elcentoj islamanoj en Bulgario ol en Albanio. Sed estas la malo. Do, mi iomete gratis la kapon serc'ante la kialon por c'i tiu "enigmo".
Lastatatempe mi rimarkis artikolon vian en La Gazeto ( numero 78, 31 okt 1998), nome "Albanoj je la fino de la 20-a jarcento". En tiu artikolo sur pag'o 29 vi klarigis , ke albanoj estas plimulte islamanoj kvankam preskau' c'iuj estis katolikoj au' ortodoksoj antau' 200 jaroj". Kaj vi diris, ke "tio okazis por rezisti al slava asimilo".
Dum la tempo de Skanderbeg mi supozas, ke la albanoj estis kristanoj, kaj estis pro tio, ke ili kontrau'staris la otomanojn. Sed c'u ili restis kristanoj dum la tri jarcentoj post Skanderbeg, g'is la 18-a jarcento, kaj nur post tiam Albanio ig'is islama lando? Kiel la islamig'o de Albanio protektis (as) kontrau' slava asimilo? S'ajnas al mi, ke la albanoj dum jarcentoj sukcese kontrau'staris la slavig'on , sen islamig'i. Do, mi ne komprenas kial la islamig'o de la lando okazis nur "lastatempe", t. e. nur dum la lastaj 2 jarcentoj.

Por kompreni la kialojn al tiuj tiklaj kaj pravaj demandoj, oni devas trarigardi la historion de la albana nacio g'enerale kaj kompari la similajn faktoj en aliaj landoj , aliajn naciojn.
Albanoj formig'is kiel nacion c'irkau' la IX jarcento devenante de iliroj, granda popolo log'iginta la tutan Okcidentan Balkanion ekde suda Bavario (Germanio) g'is la Golfo de Ambrakio (Grekio) sude , kaj ekde Adriatika kaj Jonia maroj okcidente g'is la Valo de Vardar (Makedonio) oriente. Kiel sciite, en V-VI-jc, Balkanion invadis la slavaj sennombraj gentoj tutfamilie (kune kun la virinoj kaj infanoj) kio estis vera tragedio por iliroj, c'ar ili devis kontrau'stari sangvers'ante novajn invadintojn. Rezulte tutaj teritorioj en nordo ( c'efe Dalmatio, valoj de Danubo kaj aliloke) estis manplenigite de iliroj kaj log'igite de slavaj gentoj kiuj dau'rigis sian ekspansion suden g'is Grekio. Iliroj devis lokig'i en pli sekuraj landoj, c'efe en la montara Albanio kaj en la kampoj de Kosovo kaj Vardaro. Slavoj estas karakterizitaj de forta asimilforto, tamen iliroj kaj iliaj rektaj posteuloj sukcesis rezisti iugrade. Dume albanoj konservis la kristanan kredon.
Ili konservis la lingvon, kulturon kaj tradiciojn. En XIV jc kaj pli frue ankau' en albanajn teritoriojn, lau' kelkaj donitaj'oj, ekdisvastig'is islamo pere de hispanaj kaj siciliaj islamaj misiistoj. Kompreneble la osmana invado en XV jc pliebligis tian disvastig'on en la albanan log'antaron sed ne tiom notinde je komenco, c'ar albanoj havis fortajn sentojn je sia religieco [3]
Aliflanke albanoj kiel la aliaj popoloj sub la otomana jugo povis pluteni sian religiecon viva ankorau' pliajn tri jarcentojn c'ar mem Islamo estas tre tolerema religio. Estas jam konate ke unu el ties principoj diras "Ne estas impono en la religio" (Kurano 2, 256). La centro de ortodoksismo almenau' de tiu greka , patriarh'ejo, estas ankorau' en Istanbulo. Ne okazis tiel al slavoj kaj grekoj. Estas jam konate ke dum la tempo de regado de Stefan Dus'ano oni devigis albanojn konvertig'i de katolocismo al ortodoksismo perforte. Se iu kontrau'staris oni stampigis lian vizag'on per ardig'inta fero. La samo okazis kun albanoj de certaj albanaj teritorioj en Montenegro kaj Serbio post la rusa-osmana milito (1877 kaj poste) kiam serbo-montenegranoj mortigis 120 000 albanojn kontrau'starig'intaj la konvertig'on de sia katolika au' islama religieco al ortodosismo.
Pro tio la proceso de islamig'o iris tre malrapide. Komence islamig'is nur la albanoj dungitaj en la s'tata administrantaro, en armeo, en diversaj servoj al la regantoj ktp. Ekzemple en la Okcidenta Makedonio jenas tiaj donitaj'oj: jaro 1467 en Dibro kaj Reko estis preskau' neniu islamano, kaj en 1725 islamanoj konsistigis c'irkau' 42 % de la log'antaro; en Tetovo (jaro 1450) estis 60 islamaj familioj kaj 153 kristanaj, kaj en la jaro 1468 , 41 islamaj kaj 180 kristanaj; dum en ties vilag'oj nur 9 islamaj…; en Kerc'ovo en la jaro 1480, 45 islamaj familioj kaj plimulto kristanaj; en Struga en la jaro 1582 kompare kun 1550 la nombro de islamanoj sepoblig'is dum tiu de kristanoj malpliig'is de 1100 g'is 915. Simile okazis en Albanio kaj la aliaj lokoj log'ataj de albanoj.
Dum la XVIII jc okazis drasta s'ang'ig'o: la otomana imperio dekretis novan impostosistemon tre pezan. Interalie oni mencias la imposton konata G'izjo, tute ne eltenebla ekonomie. Pro tio, albanoj preferis amase islamig'i kaj tiel akiri la rajton soldatig'i ol

[3] Ni rememoru ke iliroj estas akceptintaj la kristanismoj inter la unuaj popoloj en Eu'ropo, ili ec' estas oferintaj la unuajn martirojn. Plue estis la ilirdevena romia imperiestro la Granda Kostandino el la urbo Nish (hodiau' en Serbio) kiu dekretis kristanismon kiel s'tatan religion de la imperio kaj fondis la urbegon de Kostandinopojo (hodiau' Istanbulo).

pagi tiun imposton ( la imposto ekskludis islamanojn, kristanoj rajtis ne soldatig'i). Fakte la amasa konvertig'o de albanoj al islamismo difinis ian dividlinion inter albanoj kaj slavoj au' grekoj almenau' en la landlimaj partoj (vidu hodiau' Makedonion: tuta okcidenta parto log'ata de etnaj albanoj estas islamana, la orienta parto makedon-ortodoksa, same en Kosovo, Montenegro au' Grekio kie albanoj apartenas al islamismo au' katolicismo). La nova religio estis iamaniere protektilo kontrau' la forta influo de la "slavo-kristana" au' "greko-kristana maro", samkiel estis katolicismo por poloj, hungaroj, kroatoj kaj aliaj nacioj kontrau' ruso-slavoj kaj serbo-slavoj.
Ni devas kompreni la gravan veron ke islamig'o de albanoj tute ne signifas ilian osmanig'on au' turkismig'on, dum ortodoksismo c'iam signifis grekismig'on au' slavismig'on. ( greka patriarh'ejo deklaras ke "c'iu ortodoksulo estas greko kaj c'iu greko estas ortodokso"). Albanoj c'iam sekvis la sloganon "la religio de albanoj estas albanismo". C'iuj el ili, islamanoj au' kristanaj aspiris je libereco, sendependeco kaj ec' notinde kontribuis la la liberigo de aliaj nacioj, ekz. de Grekio en la jaro 1821, kiam la plimulto de liberigantoj estis albandevenintoj. Tio estas tiom vera, kiom en la unua greka parlamento oni diskutis kiun lingvon oni akceptu kiel oficiala, la albanan au' grekan!.En Albanio oni ne konas skismojn inter diversaj religiuloj kiel tio evidentig'as(is) ekzemple en Norda Irlando kaj Bosnio-Hercegovinio, au' kiel okazis sangvers'e en aliaj landoj grandaj kiel Francio pasintempe. En Albanio pluvivas belega kaj grandega ekzemplo de religia solidareco inter tri c'efaj religioj (katolicismo, ortodoksismo kaj islamismo!) Albanoj karakterizig'as je forta religia toleremo. Tiel kvankam iamaniere "islama insulo" en la "maro de kristanoj" albanoj neniam reprezentis ian dang'eron por la ceteraj landoj kaj popoloj. Ili c'iam estis orientig'intaj al Okcidento, ne al Oriento, malgrau' ilia islameco, c'ar ili estas kunfondintoj de la eu'ropa civilizo, log'is kaj log'as en la lulilo de tiu lasta. (Inter Grekio kaj Romio).

**<u>El la diplomlaboroj de niaj studentoj bakalau'rig'intaj</u>**

**Edi Kena**

## La urbo-muzeoj de Albanio

En Albanio en c'iu distrikto au' diversa ties areo trovig'as multaj muzeoj reprezentantaj la historiajn kaj kulturajn valoroj tipaj de tiu areo. Sed aparteco tiukampe prezentas la proklamig'o fare de la albana registaro de "Urbo-muzeoj". Unu el tiuj urboj proklamita tianome estas Berat ( foto 19 : Berat- urbo muzeo)

### Berat

Berat urbo - muzeo estas unu el la plej gravaj centroj por la historio kaj albana kulturo, viva atestaj'o de praa civilizo, samtempe g'i estas simbolo de etneca kaj kultura heredeco reprezentanta tion ne nur pro g'ia pitoreska pozicio, sed ankau' pro elstara fizionomio altiranta c'iamfoje multajn vizitantojn, enlandajn kaj fremdajn.

Berat estas ne simple urbo-muzeo ene de la kadro de Albanio. Septembre 1990 UNESCO estas organizinta en Berat konferencon pri restau'rig'oj de la ikonoj kaj freskoj, dum Perez de Kuelar (eksa G'enerala Sekretario de UNO) vizitante la urbon printempe de la sama jaro estis espriminta: Berat meritas esti unu el la ric'aj'oj de la homaro.

## Historio, arto, kulturo

Berat apartenas al la eksterordinaraj urboj, kie la fadeno de la vivo pulsas senc'ese ekde 2400 jaroj. Urboj kiel Berat havas malfacilan naskig'on. La antau'urba periodo, la antau'naskig'a ties fazo estas kontinuinta dum du mil jaroj. Tion atestas ja objektoj trovig'intaj en la muregoj de la kastelo, datig'intaj je la komenco de la bronza periodo, du miljaroj antau' Kristo.

La kastelo kun iliraj fundamentoj konservus dum la tempo ankau' konstruaj'ojn de la aliaj jarcentoj kiel VI, VIII, XV kaj XIX). Kiel tia g'i estas ne nur unu el la plej grandaj kasteloj log'ata, sed ankau' ia s'tona arh'ivejo ofertanta multvariecon de stiloj kaj kontribuaj'oj el la diversaj epokoj, kiel tiuj romia-bizanca, arberia kaj osmana. ( foto 20 : la kastelo de Berat).

Al tiu tempo apartenas ankau' la alia kastelo, tiu de Gorica ( IV jarcento antau' Kristo) starigita sur la kontrau'a monteto, formante ambau' ian tenajlon de fortifikaj'oj sur ambau' deklivoj falantaj sur la riveron Osum.

Parto el la plej gravaj de la ilira reg'lando, la urbo log'atis de unu el la iliraj gentoj plej grandaj, Dasaretoj. Dum la iliro-romiaj militoj kaj makedono-romiaj, la urbo transpasus foje sub la dependecon de Makedonio, foje sub ties iliran. En la jaro 200 antau' Kristo la urbo falis sub romian jugon. La urbo-kastelo menciitas per la nomo Antipatrea de Polibi je la jaro 216 antau' Kristo. Samnome g'i estas priskribita poste de Tit Livi, kiu diras ke g'i estas granda, potenca sur malvasta gorg'o. Li rakontas pri la krueleco de romia konsulo, kiu pro ne volonta ordonaciig'o de la urbo respondis sovag'e: " mi mortigis c'iujn el 16 jara kaj pli, mi permesis al la armeo sin j'etu por militkaptaj'oj, detrui la muregojn kaj bruligi la urbon".

Ekzistas ankorau' alia hiptezo pri la nomumo de la urbo antikva per Bargul. G'i menciitas de Tit Livi en la Romia-Makedona Traktado de la jaro 205 antau' Kristo apud la urbo Dimal. Tiu nomo en la ilira lingvo signifas blanka, konservig'us ankau' pli poste en la bizanca kaj slava tradukaj'oj, dum Antipatrea rememorig'as en Dasareti kiu estas zono en Korça kaj Pogradec hodiau'.

Romianoj estas nomintaj la urbon Albanorum Oppidum ( la fortreso de albanoj). Dumtempe Berat farig'is c'efcentro sin distinganta ankau' pro g'ia alta nivelo de kulturo, kies indikaj'oj estas la famaj kodikoj de tiu tempo.

Sed alvenas la Mezepoko, venas ankau' la nebulo en Berat-on. Vico da aliaj albanaj urboj preter g'i estingig'as. G'i mem staras restante la sola en vasta spaco: la kampo antau'e kaj la montoj malantau' g'ia dorso. G'i transvivas ankau' danke al la voja reto de suda Albanio kiuj nodig'is en Berat, sed ankau' danke al geografia pozicio kiel punkton kie renkontig'is la kamparo kaj la montaro certiginta ekonomiajn provizaj'ojn.

En la jaro 860 Berat okupig'as de bulgaroj , kies jugo longis g'is la jaro 927 kiam revenas la bizanca jugo dau'ranta g'is 969 jaro.

La bulgara okupacio en g'ia dua fazo finig'anta en la jaro 1018 baptas Berat per la nomo Belgrad, "blanka fortreso".

Falig'inte la Bizanca Imperio je la jaro 1204, Berat farig'as unu el la c'efaj sidejoj de despoto de Epiro, plifortig'inte lau' la lasta parolo de la tempo.

La grandan gravecon de Berat pruvas ankau' la komencig'o de XIV jarcento kiam registoj el Berat enpostenig'as kiel altajn funkciulojn de Bizanco.

En la jaro 1417 ankau' Berat ekfalos sub osmanojn. Gjergj Kastrioti- Skanderbeg, prikonsiderante la gravecon de la urbo, sieg'is g'in julie 1455, sed la surpriza alveno de 40 000 osmanaj c'evalrajdistoj alportis grandan perdig'on. Sub la muregoj de la kastelo mortig'is preskau' c'iuj italaj soldatoj forsenditaj de Alfonso V de Aragono por helpi al Skanderbeg..

Certe la simbolo de la urbo estas la kastelo ( foto: la kastelo de Berat). En la turka registro de la jaro 1431 en la kastelo de Berat oni nombris 227 familioj kun c'irkau' 1500 log'antoj.

Ankau' dum la osmana okupacio Berat plurestis unu el la plej grandaj urboj de Albanio.

La urbo g'is la komencig'o de XX jarcento havis bonan tiutempan infrastrukturon . Unu el la s'losilaj vojaj punktoj direkte al Oriento al Kostandinopojo, g'i estas startpunkto ankau' de alia vojo kondukinta al Sudo, Janino kaj pluen al Grekio.

La plej praa monumento, la kastelo ( foto: la kastelo de Berat) starig'as sur monteto 187 m alta, kiu de la suda flanko falas sur la riveron.

Estas g'i bela kastelo, des pli la domoj konstruitaj ene de g'i pluvivas ankorau' hodiau' danke ankau' al la restau'riga laboro de fojo al fojo de specialistoj de Instituto de Monumentoj de Kulturo.

## Kodikoj de Berat

Danke al digna fanatikeco por konservi ilin sanktaj, en Berat estas konservitaj monumentoj de manuskriptoj. La plej grava el tiuj estas la Purpura Kodiko, skribita en VI jarcento je rug'a koloro, pro kio g'i estas nomita tiel "purpura". G'i enhavas partoj el la evangelioj de Mateo kaj Marko. Estas malkovrita en la jaro 1868, estas pristudita kaj publikigita de franca esploristo P. Battifal en la jaro 1884. Prikonsiderante la tempon kiam g'i estis skribita , IV jarcento, g'i estas unu el kvin aliaj kodikoj je mondskale.

Kelkaj kapiteloj kaj kolonoj atestas ( foto: kapiteloj kaj kolonoj) pri la paleokristanaj preg'ejoj en Berat en IV-VI jarcentoj kiel la preg'ejo de Shen Todhri. Elstaraj konstruaj'oj el XIII-XIV jarcentoj estas same la preg'ejoj de Shen Triadha, Shen Mehill ka.

La preg'ejoj estas ja perloj de la mezepoka arkitekturo en Berat. La urbo estis kontinuece grava eklezia centro. La preg'ejoj estis multnombraj ene de la spaco de la kastelo, kie , kiel estas skribite pli supre, estas trovitaj ankau' objektoj tre raraj kiel ekz. Epitafo de Gllavenica.

La preg'ejoj de Berat estas vestitaj per muraj pentraj'oj je stilo bizanca kaj postbizanca kaj enhavas verkaj'ojn de diversaj artistoj, nekonataj g'is grandaj majstroj el XVI jarcento kiel Onufri. Kiel reprezentanton de la postbizanca arkitekturo estas la katedralo de Shen Meria en la kastelo. G'i sin distingas pro gravurita ligna ikonujo.

Dum el la konstruaj'oj de muslima kulto estas la Rug'a Moskeo el XIV jarcento kaj la Blanka Moskeo el XV jarcento en la kastelo. El la plej belaj estas la Plomba Moskeo ( XVI jarcento), konstruita de unu el posteuloj de la potenca feu'da familio de Berat, de Skuraj.

Tiu moskeo ( foto: Moskeo el Plombo) estas la plej granda tiatipa en Albanio. Ni menciu c'i tie ankau' aliajn moskeojn kiel la Reg'an Moskeon, la moskeon de frau'loj kaj la Teqe-on de Helvetianoj ( dua duono de XVIII jarcento) (foto: Teqeo en Berat).

## Muzakoj

estis potenca feu'da albana familio. Ili havis kiel terposedaj'on Berat-on. la lasta el tiu familio Gjon Muzaka estis devigita post la plena okupacio de Albanio de osmanoj elmigri al Italio ( Napolo).

## Mangalemo kaj Gorica

Mangalemo kaj Gorica estas du kvartaloj sin distingantaj pro la interrilatig'o kaj harmoniig'o kompleta al la tereno. La ensemblo de la kvartalo Mangalem konsistigas perlon en la arto de konstruado kie la harmonieca kompozicio de la log'ejoj atingis la plej altan skalon.

Aliflanke , kontrau'e, Gorica estas , kiu neniam vidas la sunon dum la tuta vintrosezono. Estas same bela. la ponto de Gorica apude , kiu estas transformig'inta de ligna ponto en s'tonan ponton konstruita en la jaro 1780. Estas g'i bela ponto kun 7 arkoj. estas g'i unu el la fascinaj'oj de la urbo, elegantaj'o el blanka s'tono.

Parto de la alloga spektaklo ofertanta Berat estas ankau' la montoj g'in c'irkau'antaj, Tomorr oriente kaj Shpirag okcidente. Tomorr estis la loko kie la albanoj preg'is. Monto videble ne havanta ian rilaton al geografio g'i apartenas al mitologio, malnovaj kultoj, konsiderita ankau' kiel la reg'o de la albanaj montoj, sed ankau' patro-Tomorr ( foto: monto de Tomorr)

Kiel prapratempa punkto por pilgrimadoj en la jaro 1600 g'i komencas farig'i la c'efa simbolo de albanaj bektas'ianoj. ( muslima sekto).

En la urbo de Berat trovig'as kelkaj muzeoj. Unu el ili estas la muzeo "Onufri" kiu estas konstruita en la internaj ejoj de katedralo , en la preg'ejo " Dormo de Shen Meria" en la kastelo. En tiu muzeo estas ekspoziciitaj ikonoj el XIV -XIX jarcentoj, religiaj liturgiaj objektoj kaj lignaj laboraj'oj de bizanca preg'ejo. Onufri kaj liaj posteuloj atingis la kulminon de la ikonografia kaj albana eklezia mezepoka arto en XVI jarcento. La komencig'oj de lia laboro en Berat atestig'as de ikonoj de ikonujo de preg'ejo de Evangeliko kaj freskoj de preg'ejo de Shen Todhri. Centre de la katedralo starig'as la preg'ejo je bizanca stilo per mirindaj gravuraj'oj en ligno de ikonujo, jaroj 1797-1817.

## La etnografia muzeo

Tiu muzeo estas starigita en la jaro 1979 en la ejoj de karakteriza domo de Berat; estas g'i duetag'a, kun malfermita vestibla halo; en la unua etag'o trovig'as la arkeologia pavilono, imitaj'o de mezepoka strateto kun butikoj, metiejoj diversaj kiel arg'entfarejo, lanjakfarejo ka. samkiel malgranda pavilono de arkitekturo; en la dua etag'o trovig'as la karakteriza sidc'ambro , la teksejaj laboraj'oj, dormoc'ambro, kuirc'ambro kaj gastoc'ambro kun objektoj kaj ujoj por la vivo kaj c'iutaga laboro.

Berat kiel urbo-muzeo ofertas ne nur monumentojn de la pasinto, sed tie trovig'as ankau' aliaj institucioj kaj konstruaj'oj pliric'igantaj c'iamfoje la kulturon kaj la historion de tiu patempa urbo.

Ni mencios ekzemple la galerion "Eduard Lir" ( Edward Lear) kiu estas arta galerio kaj kie estas ekspoziciitaj multaj laboraj'oj de elstaraj berataj pentristoj , same de aliaj pentristoj.

Estas g'i unu el la c'efaj institucioj de kulturo en Berat, estas en g'i 3 ekspozicihaloj je alta teknika nivelo.

La urbo de Berat estas proklamita urbo- muzeo en la jaro 1961.

**Kruja kaj g'iaj monumentoj**
**(foto: Vidaj'o el Kruja)**

La pitoreska urbo de Kruja estas konstruita sur la okcidenta faco de la monto samnoma, je alteco c'irkau' 600 m super la marnivelo.

Pri la urbo de Kruja, pri g'iaj historiaj kaj kulturaj valoroj estas skribite sufic'e multe. Ec' skribaj'oj pri g'i elvenas ekde XVI jarcento, de Marin Barleti.

En la s'tonega parto de la monto de Kruja estas starigita la kastelo, unu el la plej valoraj historiaj monumentoj de nia mezepoko. Estante kun favorebla natura protekteco tiu s'tonega parto konsistigas en si mem naturan fortreson.

En la historiaj dokumentoj Kruja menciitas unuafoje per sia nomo en la ekleziaj aktoj de IX jarcento kiel episkopa centro. Dum la bizanca periodo pasas longa tempo sen dokumentaj donitaj'oj pri Kruja, dum en la postaj jarcentoj ili plimultig'as. En tiu periodo en Kruja instalig'as gardistaroj kaj governoroj bizancaj, sub kies regado g'i restis g'is la fino de XII jarcento ( foto 23: kulta monumento en Kruja)

Kruja kiel pratempa urbo , dum mezepoko estis grava kastelo kaj la kerno de la unua albana feu'da s'tato, formig'inta c'irkau' la jaro 1190 c'ekape la lokan reganton arberes'on Progon.

G'ia kastelo konsistigis la sistemon de kasteloj signalintaj kaj defendintaj enkaze de dang'ero Durres-n, haven-porto el la plej gravaj.

Kruja estas menciita sufic'e multe de mezepokaj kronikistoj aparte pro g'ia rezistado kontrau' la osmanaj atakoj. Unuafoje g'i okupiga's de turkoj en la jaro 1396 sed pli poste dum 20 jaroj restas libera. Estas g'uste la periodo 1443- 1478 kiam la kastelo de Kruja akiras grandan popularecon en la tuta Eu'ropo. Tamen estas dirende ke la kastelo estis trafita de grandaj damag'oj dum la longa jugo de otomanoj. Tiu kastelo estis sieg'ita tri fojoj de multnombraj fortoj de turkaj c'evalrajdistoj al kiu rezistis brave la albana popolo.

Kiel tion bele difinas germana sciulo el XVI jarcento ( foto: ) " la fortan kaj nesubigeblan kastelon turkoj sukcesis forkapti nur danke al la malsato je 16 junio 1478" t. e. dek jarojn post la morto de Skanderbeg, nia nacia heroo, gvidinta la popolon 25 longajn jarojn.

La detrua ondo de turkaj ekspedicioj estas ruiniginta ne nur la urbojn sed ankau' la plej belajn verkojn de arkitekturo kiel la kastelojn, palacojn de nobeluloj kaj la publikajn domojn hereditaj de la pasintaj jarcentoj. Kune kun ili estas detruitaj au' perditaj la verkoj de pentristoj kaj skulptistoj, estas bruligitaj au' damag'itaj la dokumentoj kaj manuskriptoj je neanstatau'igebla valoro , tamen la kastelo de Kruja kun g'iaj relikvaj'oj , kvankam amputigita , estas monumento de la spirita verkemeco de niaj antau'uloj.

La spuroj ankorau' konservataj montras ke en la c'efa enirejo de tiu kastelo, dum diversaj periodoj estas starigitaj tri pordoj por ke la eniro en la kastelon estu kontrolata kaj protektata kiel eble pli bone enkaze de perarmila atako.

La multaj invadoj sinsekvintaj unu la alian transformis Kruja-n en arenon de eventoj kaj bataloj, kiuj estas postlasintaj iliajn spurojn detruigajn. La multaj damag'oj

kaj rekosntruaj'oj trafintaj la muregojn de la kastelo malfaciligas la trovon de la spuroj plej malnovaj de g'ia konstruado.

Post la grandaj damag'oj kau'zinta al la kastelo la tertremo de la jaro 1617, alia surebenig'ado granda estis trafinta g'in en la jaro 1832 post granda ribelig'o de albanoj kontrau' turkoj. Kiel estas dirite ankau' pli supre, la otomana okupacio longis 5 jarcentojn en nia lando.

La lastaj laboraj'oj vers'ajne apartenas al XIX jarcento kiam la turkaj regantoj klopodig'is lastfoje por teni ankorau' surpiede la defendkapablecon de tiu kastelo cele al kunfrontig'o al estontaj armitaj ribelig'oj de nia popolo.

Kontrau' la c'efa pordego estis iam preg'ejo. La legendo diras ke "kiam estas enirinta Sultano Mehmet li estas detruinta la preg'ejon kaj transforminta g'in al moskeo". El tio estas restinta nur parto de minareto kaj ties ruinaj'oj.

Ene de la muregoj de la kastelo en la malsupra parto trovig'as tuta kvartalo log'ata el c'irkau' 20 domoj.

Inter la karakterizaj domoj ankorau' starantaj surpiede en "la kvartalo kastelo" sin distingas tio transformig'inta al etnografia muzeo, restau'rig'inta lastajn jarojn kaj ekipita per tradiciaj ujoj.

En Kruja konservig'as ankorau' kelkaj malnovaj log'ejoj, kiuj pliric'igas la historiajn valorojn de tiu urbo.

La arto de gravurado sur ligno en la internaj partoj de la log'ejoj kiel plafonoj, fenestroj, s'rankoj ka atingis sian kulminon je la komencig'o de XIX jarcento.

Menciendas la malnova bazaro de Kruja pro g'iaj arkitektonikaj kaj historiaj valoroj kiu ekde la jaro 1961 estas enmetita sub la protekton de la s'tato.

La bazaro de Kruja konsistas el malvasta strateto de butikoj, parte kovrita kondukanta vin al la kastelo. G'i donas la impreson de tiom malnoveco kiom vi povas pensi ke g'i apenau' estas s'ang'ig'inta ekde la tempo de Skanderbeg. Per la parta restau'rado farita al tiu bazaro dum la jaro 1966-1967 estas iel plenumitaj la mezepokaj karakterzaj'oj de la urbo de Kruja.

Sed tio kio igas hodiau' Kruja-n pli alloga por fremdaj kaj enlandaj vizitantoj estas sendube la granda memorigilo dedic'ita al nia nacia heroo Skanderbeg, kiu militis 25 jarojn kontrau' turkoj.

La Historia Muzeo "Gjergj Kastrioti Skanderbeg" kune kun la etnografia muzeo konsistigas du c'efajn centrojn historiajn por c'iu vizitanto alvenanta al Kruja. Kruja estas transformig'inta en urbo de pilgrimado kie la fremdaj turistoj vizitas g'in c'iusezone por konatig'i kun la monumentoj kaj ties historio.

## La urbo-kastelo Gjirokaster (fotoL vidaj'o el Gjirokastra)

La panoramo pri la urbo- muzeoj ne estus kompleta se ni ne parolus kaj skribus ankau' pri la urbo de Gjirokaster.

Gjirokaster estas konstruita sur la monta deklivo de Mali i Gjere, kiu donas al g'i apartan belecon, precipe de la enirflanko al la urbo dumtage, sed ankau' dumnokte. Tiu pozicio estas elektita hazarde de log'antoj, sed g'i havas kelkaj kialojn.

Unuavice estas la kialo por savi la agroteron kaj alia kialo estas la defendo de la urbo de diversaj okupantoj. La domoj estas konstruitaj c'iamfoje sur dominantaj superaj pozicioj.

Je strategia vidpunkto la tuta urbo ricevas la formon de unu kastelo, kiun la okupintoj de c'iuj tempoj malfacile dominantis. Tial ni povas diri ke la strategia penso de la malnovaj konstruintoj de Gjirokaster estis eksterordinare pristudita. ( foto 25: vidaj'o el Gjirokaster).

Estas karakteriza por c'iu domo en Gjirokaster la fakto ke g'i estas el s'tono. Do, ne nur la kastelo de la urbo estas konstruita per s'tono, sed ankau' la domoj. ( foto: vidaj'o el Gjirokaster). La urbo hodiau' estas ia muzeo vizitata de multaj turistoj. La kastelo trovig'as sur strategia pozicio. La c'efa enirejo de la kastelo estas konstruita en malvasta formo, c'irkau'ita de fortaj murstratetoj kaj el du-tri etag'oj de ene por militistaj manovradoj. Dum la fino de la kastelo estas pli larg'a, c'ar g'i rigardas al la monta flanko.

La interna parto de la kastelo estas konstruita per granda kapableco je strategia vidpunkto.

Estas ja karakteriza la tuta defenda murstrateto ekde g'iaj fundamentoj.

En la kastelo trovig'is ankau' akvokondukilo konstruita de Ali Pasha Tepelena, elstara albana feu'dulo.

La konstruaj'oj per s'tono dum longaj jarcentoj ne estas faritaj pro ekonomiaj kialoj. sed pro la fakto ke la s'tonaj domoj estas pli fortaj ol tiuj konstruitaj per brikoj au' kirpic'oj.

C'iu domo en Gjirokaster, granda au' malgranda estas c'irkau'ita per muregoj. Tiuj muregoj kiuj dum la jarcentoj fojfoje falig'is, post iome ili denove rekonstruig'is. Tiuj muregoj konstruig'is per ne grandaj s'tonoj, sed duongravuritaj.

Multaj domoj havas iliajn enirpordegojn c'e la strato. La grandaj "pordoj" t. e la eksteraj pordoj estas konstruitaj je fajna artisma gusto. La supra arko de la pordo estas perfekta kaj la centra s'tono estas larg'a desupre kaj mallarg'a demalsupre. Sur tiu s'tono multfoje oni skribis la daton de la konstruado au' oni skulpis sur g'in ian ornamaj'on.

G'enerale la domoj estas du au' tri etag'aj , sed estas el tiuj kiuj estas unuetag'a. La domoj havas balkonojn, kiuj ne estas modernaj, sed belaj kaj mirindaj. De tiuj balkonoj pendas ofte floroj kaj florvazoj. (foto: vidaj'o el Gjirokaster).

La domoj ene kaj ekstere havas konstrukciojn kaj diversajn stilojn kaj c'io estas harmoniigita, neniu malhelpas la alian, nek la blokoj, nek la muroj, nek la arboj. C'io ilia estas simila kaj samtempe malsama. La pordoj s'ajnas la samaj sed c'iu pordo diferencas ne nur pro grandeco sed ankau' pro s'tonaj arkoj. Artisma nekomparebla gusto.

Gjirokaster komencis konstruati ekde VI jarcento, do g'i estas mezepoka urbo.

Aparta poezio de la urbo estas ties stratoj donantaj al Gjirokaster jen la aspekton de iu urbo, jen la aspekton de granda kaj potenca vilag'o. Estas en g'i stratetoj inter du domoj kie du homoj ne povas iri unu kontrau' la alia.

La bazaro de Gjirokaster konsistigas monumenton en si mem. De la centro de bazaro malsupreniras au' supreniras c'iuj stratoj ligantaj la kvartalojn de la urbo. Por antikva urbo, kiel Gjirokaster, la centro de la bazaro estas artisma arkitektonika solvo envere originala. C'iuj stratoj havas diversajn longecojn, ilia larg'eco estas preskau' la sama, ne estante iam monotonecaj kaj la konstruaj'oj, vendejoj, kafeterioj ka konstruitaj per s'tono donas al ili raran belecon.

C'iu domo en Gjirokaster konsistigas muzeon en si mem.

Kaj ne estas nur la materialoj donantaj apartan belecon al urbo -muzeoj kiel Berat kaj Gjirokaster, sed ankau' mem la maniero de projektado, la verkema imageco kiel ene tiel ekstere por doni al la medio tian belecon kiu plibeligas c'ion.

Gjirokaster ofertas c'iam pli mirindan belecon.

C'ar g'iaj domoj estas konstruitaj per s'tono, g'i nomig'as ankau' s'tona urbo. La dominanta koloro estas plie la griza koloro, c'ar la s'tonplatoj kovrantaj la domojn posedas tian koloron.

Gjirokaster estas urbo vizitata pleje de fremduloj kaj turistoj.

Pro la grandaj valoroj arkitektonikaj, historiaj kaj kulturaj, Gjirokaster estas proklamita urbo- muzeo**.**